

Kiel do reagis la vivestaĵoj? Sur plene glaciiginta planedo ĉiu vivo ja pereus. Sed certe ekzistis glacialiberaj tajdozonoj, kanaloj el sala fluidaĵo, varmegaj fontoj apud vulkaninsuloj kaj senglaciaj areoj pro glaci-drivoj kiel nuntempe ĉe la norda poluso. Sed sendube la specio-diverseco malplialtiĝis kaj la evoluo de plurĉeluloj estis malhelpata. Speciaj varioj evoluis fine de la lasta granda glaciepoko, antaŭ ĉ. 575 milionoj da jaroj, kiam disdividiĝis la stranga *Ediacara*-faŭno. Post la senglaciigo la vivo enorme kaj rapide multiĝis kaj ankaŭ plialtiĝis la oksigenproduktado. La kaŭzo ne estis nur la varmiĝo, sed ankaŭ la grandaj kvantoj de nun disolvigintaj nutraĵeroj. En la gigantaj liberigitaj akvosurfacoj nun povis sin speguli la lumo de nia atmosfero – kaj tiel fine transformiĝis la blanka neĝobulo al blua rulglobego. (2007-07-06)

### Krinologio

Meze de la 14-a jarcento la jupoj de virinaj vestaĵoj pli kaj pli malstriktiĝis, Ĉar ili ne devis plilongiĝi, ili estis nevideble trateksitaj per krino. Tiel ili estis rigidaj kaj neflekseblaj, neĉifeblaj, nedispromeblaj. Por nun de interne apogi la jupon, oni konstruis “skafaldon” el pluraj subjupoj, kiuj ankaŭ estis subŝtofitaj per krino, treditaj per ŝnuroj kaj sur la orlon oni tredis pajloplektaĵon. Eĉ estante el malpeza ŝtofo, la kvar aŭ kvin subjupoj tamen estis nur malfacile manovreblaj. En 1856 iu havis la subitan ideon anstataŭigi la krinoremburaĵon per ŝtala rubando – kaj kun la ideo ankaŭ 250 000 frankojn en tempodaŭro de nur kvar semajnoj. La skatolecaj kaĝosimilaj ujoj aŭ kestoj, nun nomataj “krinolinoj”, ne plu bezonis krinon – kaj ankaŭ ne plu kelkajn subjupojn. (2007-08-04/05)

### Medioinfluo aŭ heredaj ecoj

S-ino *Kellogg* estis pli ol skeptika kiam ŝia edzo *Winthrop* (1898-1972) la 21-an de junio 1931 hejmenvenante kunportis Guaon. S-ino *Kellogg* estis profesoro pri psiĥologio ĉe la Universitato de Pensilvanio, Guao estis sepmonat-aĝa ĉimpanzo-knabino. Oni decidis, ke Guao devis elkreski kaj grandiĝi kune kun la 10-monataĝa filo Donald. Unufoje por ĉiam oni volis klarige malkonfuzi la demandon, ĉu simio povas fariĝi homo aŭ ĉu ĝi – pro heredo – estas damnita-por-ĉiam al simio-estado. Tiel komenciĝis por Guao la ethoma ĉiutago: botelsuĉado, poste manĝi kulere el glaseto, ĉiutage en la banejon, veturi infanĉarete, porti ŝuojn, dupiede rekteiri, lite dormi. Sed la problemoj venis baldaŭ. Eta Donald trovis Guaon fascinega. Jam baldaŭ li tiom bone kvarpiede kuris kiel la malgranda ĉimpanzino, lernis uzi siajn lipojn kiel ilon por kapti kaj preni, akresone kriĉis kiam li ektimis aŭ malsatis. Post naŭ monatoj la psiĥologoj finis la eksperimenton. Rezulto: Simioj ne povas fariĝi homoj, aliadirekte – senprobleme. (2007-06-26)

### Scienca ĉiĉo eŭropunia

#### Ŝanĝopropoj per “kvieta poŝto” (aŭ: Kiom kostas 1-paĝa tradukaĵo ĉe la 23-oficiallingva EU?)

La traduklaboro ĉe Eŭropa Parlamento ne estas facila afero: en Bruselo kaj Luksemburgo regas babilona lingvoĥaoso.

Pli ol 20 jarojn s-ino *Angela Wicherz-Lindner* laboris en la “babilona turo” kaj trabatalis al si vojon tra “densejo de gramatiko kaj semantiko” – tiel ŝi priskribas sian laboron sur *Kirchberg* en Luksemburgo, kie troviĝas la tradukservoj de Eŭropa Parlamento.

Laŭ la biblia tradicio la tur-konstruado en Babelo fiaskis pro tio, ke Dio kaŭzis babilonan lingvokonfuzon: ĉiu parolis en sia propra lingvo, neniuj komprenis la aliulon. Dio estis puninta la homaron per multlingveco.

La fondintoj de Eŭropa Unio ne estis enkalkulintaj la eblecon de Dia puno. Sekve ili decidis, ke ĉiuj lingvoj estu egalrajtaj, kaj ĉiu EU-membro havu la rajton al sia propra lingvo. Ĉio estu komprenata kaj ĉiuj estu aŭskultataj. Respondecaj pri tio: lingvotradukistoj kaj interpretistoj.

*Angela Wicherz-Lindner* devis daŭre batali, kadre de Eŭropa Parlamento, kontraŭ la lingvokonfuzo. En la jaro 1985 la patrino de 3 infanoj decidiĝis por tiu ĉi tasko – la tradukado jam de la junaĝo estis ŝia arda pasio. Ekde 1985 validas por la Duseldorfanino, kiu studis la italan kaj francan lingvojn ĉe la Instituto por Interpretado en *Heidelberg*, Germanio, **la laŭplana labornormo: po 1 paĝo hore, do po 8 paĝoj tage**. Da tio plej ofte fariĝis multe pli: raportoj, oficialaj ŝanĝopropoj, peticioj, paroladoj el politiko, mastrumado, administrado.

Post dek-unu jaroj ŝi suferis kolapson de la nervosistemo. En la epoko de la “Traktato de Romo”, kiam por la tiamaj sesŝtata komunumo kontentige sufiĉis 4 lingvoj, oni povis facile interkompreniĝi. Sed la intertempe 27-membroŝtata Eŭropa Unio, en kiu ekde la 1-a de januaro 2007 estas parolataj 23 oficialaj lingvoj, fariĝis kvazaŭ sinonimo por babilona lingvokonfuzo.

La nun plej granda (kaj certe plej multekosta) traduk- kaj interpretad-servo en la mondo **devas traduki, ĉiun jaron, preskaŭ tri milionojn da paĝoj** por la EU-parlamento, EU-konsilio kaj EU-komisiono. La fino de la lingvo- kaj paĝo-inundo ne videbliĝas – kaj la kostoj daŭre plialtiĝas.

Jam delonge la deputitoj kiel ekz. la kvestoro (kasisto) prezidant- koncerna ĉe la Eŭropa Parlamento, *Ingo Friedrich*, postulas finon de la multe kostanta eksperimento ordigi la lingvojn. Laŭ raporto fare de Eŭropa Financkontrolejo en la jaro 2005 la elspezoj por tradukoj estis ĉirkaŭ 128 milionoj da eŭroj por la Parlamento, 126 milionoj da eŭroj por la Konsilio kaj 257 milionoj da eŭroj por la Komisiono. **Unu paĝo kostas averaĝe ĉe la Komisiono 194 €, ĉe la Konsilio 276 € kaj ĉe la Parlamento 119 €.**

Jaron post jaro fariĝis pli da paĝoj, kiujn *Angela Wicherz-Lindner* kaj gekolegoj devis traduki – pli frue per diktado al sekretario, nuntempe per komputilo. La EU-pligrandiĝo de 2004 kaj 2007 kaŭzis rapidan plialtiĝon de la lingvonombro. Hodiaŭ la tradukistojn konfrontas 506 eblaj tradukkombinoj, ĉiu lingvo devas esti prilaborita de la koncernaj landaj tradukservoj: la angla, germana kaj franca same kiel la gaela, malta kaj kataluna – ĉar lingvoj apartenas al la nacia identeco. Kaj tiel insistas la irlandanoj pri sia gaela lingvo, kvankam eĉ ne 2% de la samlandanoj ĝin ĉiutage uzas. Kaj tiel la maltanoj insistas pri la malta, kvankam preskaŭ ĉiuj maltanoj pro la longa brita koloni-epoko regas la lingvon de siaj iamaj koloniaj mastroj.

Ĉiam denove prezentiĝas proponoj, kiel oni povos regi la lingvoĥaŭson. Sed fine ĉiu membroŝtato sin apogas sur la principo “Unueco en multeco“, per kiu la komisionoprezidanto *José Manuel BARROSO* deklaris la multlingvecon “strategia demando por la estonto de la Unio“.

Tute samsence al tiu principo agas ankaŭ la komisaro pri multlingveco *Leonard ORBAN*. Li prezentis la “Politikan Agendon por Multlingveco“, en kiu legiĝas: “La multlingveco estas en Eŭropa Unio ĉiutaga realaĵo. La Eŭropa Komisiono plenumas la devon cele de konservado kaj subteno de tiu esenca karakterizaĵo“. Por tamen iom moderigi la ĥaŭson, provizoraj dekretoj kaj ekstremkazaj ordonoj limigas la longecon de dokumentoj. Tiaj surpaperaĵoj devas

esti unue tradukataj en unu el la “relajksaj lingvoj“ – la germana, la angla, la franca – kaj nur poste en aliajn lingvojn. S-ino *Wicherz-Lindner* nomas tion “Kvieta poŝto, fazo unua“. Ŝi neniam estis feliĉa pri tiu rejlaslingva ordigo: la respondeco por la tradukanto estas tro granda, la limdatoj ĉe tiaj relajksdokumentoj tro mallongaj.

Por *Angela Wicherz-Lindner* neniam estis ĝena la temo lingvomulteco: “Sed mi ofte estis malkontenta, ĉar mi ne havis sufiĉe da tempo, traduki la tekstojn tiom bone kiom mi fakte povus“. Kelkfoje ŝi eĉ ne plu sciis post la laboro, el kiu lingvo ŝi tradukis. La plendon de kelkaj deputitoj, ke certaj dokumentoj estos tradukataj nur post monatoj, *Angela Wicherz-Lindner* kontestas: “Ĉiuj tekstoj estas tradukitaj en laŭreglamenta tempo, eble daŭras foje unu tagon pli longe, sed ne pli“. Okaze de tro alta laborŝarĝo, la departementestro postulas limtempan prokraston aŭ permeson de ekstraj laborhoroj.

La buĝetkontrola komisiono tamen priskribas la produktivecon de la tradukservoj de Eŭropa Komisiono malpli alta ol tiun de “privataj tradukistoj“, krome ĉirkaŭ trionon pli favoraj. Ankaŭ al tiu kritiko kontraŭdiras *Wicherz-Lindner*: “Miaj laboroj ja ne nur konsistas el tradukoj. Apartenas al miaj devoj ankaŭ reviziaj laboroj kaj plua persona edukado kun lingva pliperfektigo.“ Tiel ŝi lernas dum sia laboro ĉe la Eŭropa Parlamento (flanke de ĉio alia) la hispanan kaj nederlandan lingvojn, kaj vizitis anglalingvaj kursojn por perfektigi sin ankaŭ en tiu ĉi lingvo. Kiam ŝi en oktobro 1985 translokiĝis al Luksemburgo, oni tiam ricevis ankoraŭ pluan edukadon en la hispana kaj portugala lingvoj. Antaŭ jaroj aldoniĝis ankaŭ la kroata kaj turka.

Speciala defio ĉe la tradukado, opinias *Angela Wicherz-Lindner*, kuŝas “en la detalo“: multaj tekstoj estas plenaj de subtilaĵoj, dosieroj enhavas fakvortojn, kaj ofte dependas de tio, ke gravas en la konstruo la nuancoj por optimuma traduko. “Ĉiam denove okazas, ke oni ne konas la faknociojn: tiujn oni devas explore elreserĉadi. Antaŭe oni tralaboradis vortarojn aŭ telefonis, hodiaŭ helpas la interreto“.

La egalrajtecon de la lingvoj ŝi konsideras senchava ĉar ja temas pri kultura diverseco kaj pri tio, ke la civitanoj povas informiĝi en

siaj propraj lingvoj. Tiumaniere Eŭropo pli bone proksimiĝas al ili: “Kiu nenion ekscias en sia gepatra lingvo, tiu havas eĉ pli da antaŭjuĝoj“. Precipe problema tamen trovas *Wicharz-Lindner* la antaŭan kontraŭopinian ĝeneralan tendencon. “Pli ol jardekojn dominis en EU la franca lingvo. Sed oni ne anstataŭigis ĝin per la arde diskutata lingvomulteco, sed per inklino al la angla lingvo, kiu komenciĝis post la alveno de la skandinavoj en la EU kaj plue plenumiĝas pro la ’orienta plilarĝiĝo’: “La angla estas en tiaj ŝtatoj la *Lingua Franca*“.

Intertempe 55% de ĉiuj bazaj tekstoj, kiujn ricevas la tradukistoj, estas verkita en la angla. Deputitoj riskas eĉ malbonan anglan tekston por profili sin pri mondlerteco kaj lingva inĝenieco, supozas *Wicharz-Lindner*. La rezultoj ofte frenezigas la tradukistojn. “Kelkfoje temas pri pura enigmosolvado“, ŝi diras. Al la tradukistoj pli plaĉas, se ekz. hispano uzas anstataŭ la anglan sian gepatran lingvon – sed tiun senerare.

Tio ĉio nun tute egalas al *Angela Wicharz-Lindner*. Ŝi ĵus eniris la antaŭtempan pensiigon. La infanoj estas memstaraj kaj sendependaj. Ŝi forlasis Luksemburgion kaj ekloĝis en Germanujo. Nun ŝi volas plie traduki veran literaturaron.

(Fonto: *Frankfurter Allgemeine Zeitung*, 2007-11-19) – sa

## Resumo (de la tradukinto)

La nombro de tradukitaj paĝoj ĉe EU en 1 jaro estas ĉ. 3 milionoj. Unu tradukisto tradukas 1 paĝon en 1 horo, dum 8 labor-horoj do 8 paĝojn en 1 labortago. La elspezoj (laŭ la EU-financkontrol-ejo) por traduk-laboroj ĉe la 23-oficiallingva Eŭropa Unio en unu jaro ĉe la Parlamento, Konsilio kaj Komisiono estas prezentataj en la sekva tabelo: montriĝas, ke la traduko de 1 paĝo ĉe la nuntempe 23-oficiallingva EU kostas preskaŭ 200 €.

Elspezoj por tradukoj ĉe	en la jaro 2005	averaĝa kosto por traduko de 1 paĝo
EU-Parlamento	€ 128 000 000	€ 119,00
EU-Konsilio	€ 126 000 000	€ 276,00
EU-Komisiono	€ 257 000 000	€ 194,00
<b>Totalo</b>	<b>€ 511 000 000</b>	<b>averaĝe € 196,33</b>

Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)  
Hejmpaĝo: <http://www.eventoj.hu/isae/>

Pres-indikaĵoj: ISSN 0048-9557.

Eldonanto: ISAE Eldonkvanto: 200 ekzempleroj

Laserkopiita: Februaro 2008 ĉe *Copy & Co, Marktplatz 30*

DE - 37269 *Eschwege*/Germanio

Redakcia komisiono: La estraro de ISAE kaj la du honoraj membroj

Membrokoto de ISAE : € 20,00/jare

pagebla pere de via

a) landa peranto (resp. landa delegito)

aŭ rekte al

b) ISAE-konto ĉe UEA/Rotterdam (NL): isae-z \*) *vd. sube*

IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09, BIC: PBNKDEFF

t. e. por ISAE-anoj el Germanujo: vi pagu (anstataŭ kiel pli frue al ISAE/Sachs) al la germana poŝtĉeka konto de UEA n-ro 3182 91 509, BLZ 370 100 50 en Köln, Germanio, kun indiko “ISAE-jarkotizo (...jaro...) por UEA-konto isae-z”

## Landaj Perantoj de ISAE

Aŭstralio	<i>Libroservo AEA</i> 143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.	<libroservo@esperanto.org.au>
Brazilo	<i>Brazila Esperanto-Ligo (BEL)</i> C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasília	<bel@esperanto.org.br>
Britio	<i>S-ro David Kelso</i> 5, Craighill Rd., Kilncadzow GB - Carlisle, ML8 4QT	<davidekelso@yahoo.co.uk>
Finnlando	<i>S-ino Päivi Saarinen</i> Ruorimielenkatu 5 C 23, FI-02320 Espoo	<paivi.saarinen@iki.fi>
Francio	<i>S-ro J. Charles Trébouet</i> Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil	<trebouet.bohere@club-internet.fr>
Irlando	<i>S-ino Joy Davies</i> 9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W	<noviresp@eircom.net>
Korea Resp.	<i>S-ro Cho Sung Ho</i> Biol.Fak.Inha Univ., KR Incheon 402-751	<shcho@inha.ac.kr>
Norvegio	<i>Eldonejo Esperanto</i> Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo	<hara-ryg@online.no>
Pollando	<i>S-ino Magdalena Tatara</i> Košmice Wilkie 323, PL32-020 Wieliczka	<mtatara@gmail.com>
Svedio	<i>S-ino Lisbeth Andréasson</i> Kajsa Kavats gata 8, SE - 24235 Hörby	<bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>
Usono	<i>Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA)</i> P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA	<elna@esperanto-us.org>

\*) **Nepre informu pri via membrokotozpagoj laŭ b)**

**(kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu**

**sendata Scienca Revuo) la eldonanton:**

*Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio*  
Tel./Fakso xx49-(0)5651-331866; <ISAESachs@aol.com>